

---

**38****(3 / 2002)****Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)****LEA/G****MAGAZINO****Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj  
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete****Inkluzivas la organon****de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)****La Socialisto**

---

## **La prezidanto demisias**

La nuna prezidanto de nia asocio, Albert Stephan, rezignas pri sia funkcio ek de la unua de januaro, 2003. Li opinias, ke homo en la aĝo de 80 jaroj malokupu la lokon ĉe la pinto de asocio por pli juna aktivulo. Tamen, li estas preta subteni la asociajn aktivecojn, sed nur laŭ siaj fortoj kaj spertoj kaj nur kiel konsilanto.

Li proponas akcepti kaj uzi la *Regeln des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete* (MAGAZINO n-ro 35) anstataŭ la ĝisnuna Statuto. Ĉi tiujn regulojn akceptis intertempe 30% de la membraro. Li opinias, ke la reguloj pli bone taŭgas por la daŭrigo de nia asocio. Por la eldono de la asocia informilo MAGAZINO plu aktivas Gary Mickle kun helpo de membroj kaj simpatiantoj en Berlino.


Do, ek de januaro 2003 la asocia sekretario (*Bundessekretär*) kaj la respondeculo pri la asociaj financoj gvidos la asociajn aferojn. La redaktanto de la asocia informilo respondecas pri la enhavo de l' MAGAZINO. Du aŭ tri konsilantoj estas bonvenaj. La ĝisnunaj Friedel Bues kaj Hans Rodewig ne rifuzas kunlaboron. La revizoroj espereble daŭrigos sian laboron.

La ŝanĝo signifas, ke la asocio trovu membron, kiu transprenos la oficon de asocia sekretario. Tiel longe kiel tiu posteno ne povos esti okupita, la financa respondeculo Jiri Proskovec komisie respondecos pri la sekretaria laboro, kompreneble helpate de la konsilantoj. La adreso de la asocio estas ĝis iu estonta ŝanĝo: Freier Esperanto-Bund (Libera Esperanto-Asocio) p.a. Jiri Proskovec, Heimbastr. 10, (DE-)44143 Dortmund.

Kontraŭ ĉi tiu regulo la membroj povas protesti. Bonvene estos, kiam la protesto estos akompanata de proponoj, kiuj estos konigitaj en la asocia informilo cele diskuton.

La ĝisnuna estraro  
2002-06-25

La supre menciitaj *Regeln des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete* estas represita] en ĉi tiu numero sur paĝoj 23-24. [GM]



## Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:  
 Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G) Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)  
 Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,  
 (Tel.+Fax: (07802) 90 336)  
 LEA/G per SAT en TTT:

<http://home.arcor.de/gmickle/leag/index.html>  
 Redakcio / Redaktion:  
 Gary Mickle (GM), Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47), retadreso / E-mail-Adresse: gmickle@nexgo.de  
 Hans Rodewig (HR), Stammestr. 86D, DE-30459 Hannover

Albert Stephan (AFS), adreso de LEA/G supre indikita / oben angegebene Adresse von LEA/G

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.

Redaktofino: varias (kontakto GM sub la supre indikita adreso)

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 8,- €  
 La membrokoto entenas liveradon de la bulteno.

LEA/G-konto: Jiri Proskovec n-ro 9168 434  
 Postbank Essen (BLZ 360 100 43)

Represo de materialo permesita, se la fonto estas indikita.

## novajoj

### Verduloj diskutis Esperanton

En la 3a Kongreso de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj (Berlin, 17–19 majo 2002) funkciis informstano de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE). Inter la duhoraj laboristaĵoj estis unu pri "Lingvoj en la Eŭropaj Institucioj, ekzemple Esperanto". Oni proponis du rezoluciojn pri Esperanto kaj protekto de minoritataj lingvoj. Akceptita estis rezolucio n-ro 33 de ERA kaj Patricia McKenna (Irlando), kiu celas "protekti la

anonco

Multimedia CD:

20 000 km durch 19 Länder  
 Paul Kösters Wanderung per Esperanto durch Europa 1931-1933

Der Schweriner Ralf Kuse, der bereits eine Multimedia CD sowie Videos zur Geschichte der Esperanto-Bewegung in Schwerin und in Mecklenburg-Vorpommern vorgelegt hat (vgl. Ea 4/2000), veröffentlichte kürzlich ein außerordentlich interessantes und mit modernen elektronischen Mitteln gestaltetes Zeitdokument: die Wanderung des arbeitslosen Esperantisten und Sozialdemokraten Paul Köster (1910-1998) von 1931-1933 quer durch Europa. Köster, der einen Teil der Strecke mit seinem Freund Richard Fehrmann zurücklegte, hatte über seine Wanderung in 4 Tagebüchern reflektiert (davon 3 in Esperanto) sowie ein 400-seitiges Manuskript verfasst. Über die Reiseroute von 20 000 km durch 19 Länder (mit 24 regionalen animierten Karten), über die zahlreichen besuchten Städte (es werden 291 Ort erwähnt), die meisten mit Esperanto-Gruppen oder Esperantisten, kann man sich in die vollständig aufgenommenen Tagebücher einklicken, darin blättern, Fotos und andere Dokumente aufrufen und die vor allem durch die Hilfe von Esperantisten erleichterte aber nicht ganz ungefährliche Wanderung miterleben. Systemvoraussetzungen: 4-fach CDROM-Laufwerk, Grafik: 120 MHz, ab Win95 Die CD kann bestellt werden bei Ralf Kuse, Eckdrift 49, 19061 Schwerin (8 Euro), [rok.ovo@t-online.de](mailto:rok.ovo@t-online.de) D.B.

endanĝerigitajn lingvojn kaj esplori la Paderbornan Modelon en pluraj eŭropaj landoj". Rezolucio n-ro 34 de AVE kaj Victor Cavaco (Portugalia) pri la problemoj por minoritataj lingvoj proponis i.a. la uzadon de Esperanto kiel "Relajsa Lingvo" kaj "neŭtrala reprezentanto por la aliaj regionaj kaj naciaj lingvoj, kiuj ne havas oficialan rangon". Ĝi finfine ricevis nur 33% de la voĉoj. (laŭ informo de M. Westermayer)

## La estonteco de LEA/G

de Gary Mickle

LEA/G frontas la problemon, ke ĝi verŝajne jam antaŭ longa tempo falis sub la sojlon de daŭripoveco. Alivorte, ĝiaj agadoj ne plu havas amplekson kaj kvaliton, kiu povus allogadi novajn membrojn tiel rapide kiel malnovaj membroj foriras. Ne temas pri subite akuta krizo, sed pri senĉesa krizado. Tiun sorton LEA/G dividas kun multaj aliaj esperantistaj organizaĵoj kaj agadoj, sed tio ne estas faciligo por ni.

Laŭ mi, nostalgio estas malbona konsilanto, kiam oni serĉas eliron el la malfacila situacio. En ŝanĝiganta mondo, neniu ajn socia movado povas kroĉi sin al unufoje por ĉiam fiksitaj organizaĵoj kaj aktivecprofilo. Pli indas reformuli la celojn laŭ la aktuala situacio, rigardi antaŭen kaj serĉi organizformon konvenan al la bezonoj.

La celo, pro kiu la LEA-oj de SAT fondiĝis, restas aktuala: informi pri Esperanto en laborista, respektive en klasbatala-maldekstra medio laŭ maniero konvena al tiu medio. Hodiaŭ ni eble priskribus la celgrupon per aliaj vortoj ol en la 20aj jaroj, sed la esenca tasko restas vere simila.

La metodoj, kiuj plej konvenas al la asociaj celoj, tamen ŝanĝiĝis multe, precipe dum la ĵusaj dek jaroj pro la evoluo de novaj komunikadaj teknologioj. Tio devas nepre influi la organizaĵajn strukturojn, ĉar geografiaj distancoj por multaj celoj ne plu rolas kiel grava faktoro. Nur unu ekzemplo: ekzistas hodiaŭ esperantistoj, kiuj neniam havis kontakton kun loka grupo aŭ landa asocio, ne membras en iu ajn Esperanto-organizaĵo kaj disvolvas sian esperantistecon preskaŭ tute en la virtuala spaco de la

interreto, kiu cetere estas ankaŭ bonega loko por lerni la lingvon, kion multaj faras.

Ne eblas ignori, ke la progresiva Esperanto-medio dramece malkreskis nombre, tiel, ke pezaj organizaĵaj strukturoj en asocioj kun multparagrafaj statutoj kaj plurpersonaj estraroj, en multaj kazoj iĝis superfluaĵoj. Pli inspiras min la politikaj tradicioj de SAT kaj la LEA-oj ol la organizaĵaj formalizaĵoj de tiuj asocioj, kiel ajn historiĉaj. Teni fasadecajn strukturojn starantaj kostas la tempon kaj energion de agemuloj, kies laboron oni pli bone utiligus por aliaj celoj, kiuj povus esti renovigaj.

En la situacio de la ne daŭripova LEA/G mi vidas kelkajn alternativojn:

a) simpla malfondo: Tion multaj taksus esprimo de rezignacio, pro kio mi nepre preferus eviti ĝin. Kaj mi trovas ĝin des pli politike falsa, ju pli la agadlinio, precipe la eksterendirektita, en la t.n. „neŭtrala“ movado haladzas naciismon.

b) malfondo kun rekomendo de nova strukturo: Malfondo akompanata de propono al la aliaj LEA-oj kaj SAT pri la fondo de integrita internacia grupo, kiu okupiĝu pri ekstera informado kaj prizorgado de novuloj en la ĉiam pli grava interreto kaj en tiu granda parto de la mondo, kie ne agadas iu ajn LEA. Se tia grupo jam ekzistus, estus pli simple: ni serĉus la plej oportunan manieron por transkonduki la agadon de LEA/G al ĝi.

c) refondo kiel simple strukturita, senpretenda grupo: Tio estas nenio alia ol tio, kio nun okazas en LEA/G per la alprenado de la novaj *Regeli* anstataŭ la

ĝisnuna Statuto kaj la kun tio ligita enkondukata pli simpla estrarstrukturo. Mi apogas la simpligon, sed rimarkas, ke ĝi estas provizoraĵo por mastrumi la ŝrumpadon kaj verŝajne ne solvo, kiu povos validi longan tempon.

d) daŭrigo de la agado ĝis nova strukturo estos trovita: Tio estus laŭ mi neeblaĵo, ĉar la fortoj de la Asocio jam nun ne sufiĉas por daŭrigi laŭ la ĝisnuna maniero kun la ĝisnuna Statuto kaj kun granda, multifunkcia estraro. La modesta agadprofilo de la Asocio kompreneble ne pravigus tion.

#### **Ĉu eblas ankri novan medion de informlaborantoj inter la LEA-oj?**

Mi estas ankoraŭ konvinkita, ke necesas alstrebi unu el ĉi tiuj alternativoj:

a) integrita internacia asocio por maldekstraj / progresivaj / alternativismaj esperantistoj, kiuj okupiĝus pri tia Esperanto-informado, kia konformus kun ilia politika tendenco, kaj krome pri prizorgado de Esperanto-novuloj, kiuj allogiĝas al la maldekstra Esperanto-medio. Tia asocio devus ebligi la partoprenon kaj de interret-uzantoj kaj de la neuzantoj. Ĝia statuso devus esti proksima al tiu de la LEA-oj kaj ĝi kunlaborus en la LEA-komitato de SAT,

b) simpla interreta dissendolisto – se ne sufiĉus en la komenco la homaj fortoj por realigi la unuan, kaj mi taksas tion verŝajna – kiu interrilatigus kaj membrojn kaj nemembrojn de SAT, kiuj volas okupiĝi pri la suprenomitataj celoj; ankaŭ tiu devus kunlabori en aŭ kun la LEA-komitato.

En ambaŭ kazoj nepre dezirinde estus kolekti informcelajn tekstojn (en naciaj lingvoj, sed ankaŭ kiom eble en Esperanta traduko) en tiucela TTT-ejo. Esper-

antistoj el la maldekstra / progresiva / alternativisma medio nepre bezonas facilan aliron al ekzistantaj Esperanto-informiloj, kiuj estiĝis en kaj por tiu sama politika medio.

Tio ne estas afero, kiun iu ajn povas simple fondi. Unue necesas sondi en SAT, ĉu estas sufiĉe da intereso ĉe aliaj gekamaradoj. Se jes, oni povos pludiskuti kun ili la aferon. Se ne, necesus tamen daŭrigi la pripensadon en alia (tamen kia?) direkto.

Mi volas ankoraŭ ĉi-jare diskuti la aferon kun aliaj aktivaj SAT-anoj, ĉar mi vidas la bezonon alstrebi – ne tuj, sed perspektive dum la venontaj du aŭ tri jaroj – solvon kiel sub punkto b), t.e. malfondo de LEA/G, almenaŭ en ĝia kvalito kiel formale strukturita asocio. Tio kompreneble ne malhelpus, ke plu ekzistu ne rigide strukturita, neformala grupo de multjaraj LEA/G-membroj. Kunlige kun tia malfondo gravas, ke jam estu instalita nova internacia strukturo, kiu kapablu transpreni la funkcion de publika informado kaj prizorgado de novuloj en la germanlingva regiono.

Ĉi tiu anonco ne estas aktuala informo: ĝi estas eltiraĵo el *Sennaciulo* de 1948-02. Ĝi memorigas nin pri la bezono dokumenti kaj disponigi en facile alirebla formo: a) la historion de SAT post la 2a mondmilito, kaj b) la tutan historion de la – ne senintermite aginta – Sennaciisma Frakcio.

#### **Sennaciista Frakcio**

Al ĉiuj S.A.T.anoj ni anoncas la restarigon de la Sennaciista Frakcio. Ni estas konvinkitaj, ke la tragediaj okazintaĵoj de la militjaroj ne nur fortigis la kredon de la iamaj frakcianoj, sed ankaŭ konvertis multajn aliajn al la ĝusteco de Sennaciismo. Ili, do, envic-

## ***Kiajn versaĵojn aperigas la maldekstraj periodaĵoj?***

de I. F. Bodert

Certe, la beletro, ĝenerale la arto, devas esti libera, t.e. la aŭtoroj skribu kion deziras iliaj koroj, kion naskas iliaj pensoj.

Tamen, la leganto ne estas devigata akcepti ĉion, aŭ, pli bone dirite, li rajtas preferi tion aŭ tion, ĉu laŭ enhavo, ĉu laŭ formo, laŭ genro ktp. Nu, sciante, por la homoj engaĝitaj en iu batalo, gravas la beletro apoganta tiun batalon. Tio ne estas malkovro de la nunaj maldekstruloj, sed praktiko racia; ĉar ankaŭ la kontraŭuloj ŝatas beletron apogantan siajn celojn kaj abomenas la kontraŭan.

Se ni legas la versaĵojn aperintajn en niaj maldekstraj periodaĵoj, ni rimarkas iun indiferenton rilate al enhavo. Certe, la legantoj deziras legi ankaŭ klasikajojn de diversaj kulturoj, sed *ne iun ajn* poeziaĵon nur ĉar iu tradukis ĝin E-lingven. Mi volas substreki la neceson aperigi pli da versaĵoj apogantaj niajn maldekstrajn celojn. Kiel ekzemplojn mi aldonas kelkajn spicaĵojn el la rumana poezio.

iĝu tuj en la revigligita Frakcio.

Ankoraŭ troviĝas multaj laboristaj Esperantistoj, kiuj ne klare komprenas la celon kaj signifon de Sennaciismo. Kiel eble plej baldaŭ, ni publikigos la duan eldonon de la „**Sennaciista Manifesto**“. Pligrandigo de la unua eldono, ĝi pli detale kaj celtrafe klarigos nian ideologion. La enhavo de tiu nova eldono estas strikte konforma al la testamenta deziro de K-do Lanti.

[...]

R. ROBERTS, Weet Ing. Wadsworth, Hebden Bridge, Yorks, Britio.

#### **Mihai Eminescu (1850-1889), la plej granda rumana poeto**

Detruu sociordon kruelan kaj maljustan. La mondon dividantan: riĉegaj kaj mizeraj.

(*Imperiestro kaj proleto*)

#### **Pri la siatempaj politikistoj:**

Venu vi, fama Drakulo, kaptu ĉiujn ĉi fiulojn, Dividu ilin dugrupen: frenezuloj kaj aĉuloj;

En du grandaj ejoj nigraj firme fermu ĉi mizeron, Bruligu frenezulejon, ekbruligu la karceron.

(*Satiro III*)

#### **Marcel Brolas (1903-1965)**

Tio estas la sorto de l'bovo (plenkreska bovido): Pli longe ĝi restas al pordo de l'novo (pro mank' de konfido).

(*Perplekseco*)

#### **Marin Sorescu (1936-1997)**

Kantas birdoj, preĝas plantoj, ploras arboj en arbaro:

«Kara Dio, bona Dio, liberigu min de la homaro!»

(*Ekologio*)

Etnaj rajtoj kaj lastatempe la lingvaj homaj rajtoj aparte interesas la prezidanton de UEA. Ĉar li partoprenis la seminarion «Eŭropa lingvo – utopio aŭ neceso», kunorganizitan en Zagrebo en 2001 de Zlatko Tišljar kaj menciitan en mia recenzo (LEAG-Magazino 36) de la verko *Eŭropa ideologio* de Tišljar, mi demandis, ĉu li deziras reagi je tiu recenzo. Li afablis respondi per ĉi tiu kontribuo. (GM)

## **Pri naciismo kaj sennaciismo: kie estas la limoj por prudenta agado?**

de Renato Corsetti

Gary Mickle aperigis en ĉi tiu revuo kritikon ĝisfundan pri la verko de Zlatko Tišljar, *Eŭropa Ideologio*. Estas malfacile por mi ne samopinii kun li rilate al la danĝeroj de novnaciismaj movadoj en Eŭropo. Tio estas ankoraŭ pli malfacila post la ĵusaj venkoj (aŭ almenaŭ fortiĝoj) en landaj voĉdonadoj en kelkaj eŭropaj landoj fare de la dekstraj, fremdul-malamikaj partioj.

Aliflanke, malgraŭ la pruvoj, kiujn Gary provas porti, estas por mi ankaŭ malfacile enmeti Zlatkon Tišljar kaj aliajn eŭropismajn esperantistojn en la saman faskon kun Le Pen kaj similuloj. Mi ne diras, ke Gary faras tion, sed tion supraĵa leganto povus konkludi.

Mia persona opinio estas, ke multaj eŭropaj federistoj (inkluzive de la esperantistaj) transportis al eŭropa nivelo la naciismon, kiu ne plu estis laŭmoda je landa nivelo. Alivorte, kelkaj tre fortaj eŭropistoj en Germanujo aŭ en Italujo aŭ en Kroatujo revas pri forta Eŭropo kun respektata eŭropa armeo, respektata eŭropa politiko, ktp. Tio estas simple kontinent-nivela naciismo. En la kazo de esperantistoj, tio estas ofte miksa kun esperplena kredo pri la natura boneco de eŭropa registaro en la estonteco.

Dirinte tion, tamen, mi devas diri, ke por mi estas problemo-plena ankaŭ la akcepto de la ideoj de Gary (tiom, kiom

mi komprenas ilin). Alivorte, kial defendo de malgrandaj nacioj kontraŭ la praktika subpremo fare de la grandaj estas ĉiukaze malbona? Certe tia defendo havas tre malbonajn flankojn, kiam ĝi estas nur naciismo de la malgranduloj, kiuj tute trankvile subpremas siajn malplimultojn, sed en si mem, ĝi ne ŝajnas al mi io nur malpozitiva (kiel mi ŝajnas kompreni el la vortoj de Gary).

Ĉu ni devus lasi la leĝon de la ĝangalo funkcii en ĉi tiu kampo? Ĉu Esperanto, tamen, ne vere povus kaj devus helpi?

Mi pensas, ke entute nei la rajton al slovenoj senti slovenan identecon, al germanoj senti germanan identecon, ktp. ankaŭ estas kontraŭa al la faktoj, tio estas al la efektiva ekzisto de tiuj identecoj. Certe por socialistoj la klas-dividoj estas eĉ pli gravaj ol naciaj identecoj, sed la naciaj identecoj pruviĝis esti eĉ pli fortaj ol la klas-dividoj. Ili ne ŝajnas al mi ignorindaj, ĉar se oni ignoras ilin, ili emas transformiĝi al danĝeraj, diablaj naciismoj, kiel ni jam vidis plurfoje en la historio.

Ni devus trovi la limojn inter prudenta defendo de naciaj identecoj, naciaj lingvoj kaj naciaj kulturoj kaj malprudenta apogo al naciismoj. Mi simple volas diri, ke esperantisto, kiu defendas la frisan kontraŭ la nederlanda aŭ la germanan kontraŭ la angla, ne ŝajnas al

mi nur per tio aliĝi al la novdekstraj movadoj. Se li ankaŭ disvastigas Esperanton per la espero, ke Esperanto helpas por defendi la frisan aŭ la germanan, li ne per tio estas nov-dekstrulo. Ni povas diskuti ĉu kaj kiom Esperanto pli bone defendus lingvojn kontraŭ pli fortaj lingvoj, sed tio estas eble alia ĉapitro en nia debato.

Cetere, la dekstruloj mem ĉiam tre bone komprenis la potencialan maldekstrecon de Esperanto kaj de ĉi tiuj esperantistoj, kiuj nur parolas pri paco inter nacioj kaj egaleco de nacioj. Persone mi kredas, ke estas tre pli danĝeraj tiuj, kiuj provas adaptiĝi al la etno-mortiga politiko de la angla kaj de Usono, la centro de la monda imperio.

Ankaŭ Umberto Broccatelli, prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, bonvolis komenti kelkajn el la tezoj de mia recenzo de *Eŭropa ideologio* de Tišljar, aperinta en *LEAG-Magazino* 36. (GM)

## **Plurtavola naciismo?**

de Umberto Broccatelli

Rilate al la «plurtavola naciismo», laŭ kiu ĉiu eŭropano ĝenerale havu regionan, nacian kaj eŭropan identecon, oni devas rimarki ke la naturo de la «tri tavoloj» estas tre diferenca.

Pri la nacia tavolo: historie «naciismo» estas la ideo laŭ kiu plej oportuna aranĝo de la homa socio realiĝas kiam ĉiu nacio starigas apartan sendependan kaj suverenan ŝtaton. Demokrataj naciistoj (kiel Giuseppe Mazzini) opiniis ke tiaj liberaj nacioj pace kunvivos kaj starigos sistemon de reciproka kunlaborado. En landoj dividitaj inter malgrandaj ŝtatoj aŭ sub fremdaj dominadoj, tiu ideo favoris starigon de pli grandaj politikaj unuoj – kiel okazis en Italio kaj Germanio. Tamen la ŝtatoj formiĝintaj sub la devizo de libereco de la popoloj poste fariĝis siavice konkeremaj kaj militemaj.

La nacia ideo, favoris la detruon de grandaj imperioj, el kiuj naskiĝis malgrandaj ŝtatoj. Do unuflanke ĝi agis unuflanke, aliflanke ĝi agis disige.

Granda problemo estas difini naciojn kaj nacian identecon. La «franca» koncepto bazas la nacion sur la «volo vivi kune», dum la germana koncepto bazas ĝin sur etneco kaj lingvo.

Ĉiukaze la suverena nacia ŝtato – postulema kaj ekskluzivema – estas la sanga idolo al kiu estis oferitaj milionoj da homaj vivoj.

Pri la regiona tavolo: la regiona nivelo de regado, en federacia sistemo, povas roli gravan rolon, sed regionoj ne ĉiam bazas sin sur etnaj kaj sur lingvaj aspektoj. Kiam oni volas doni troan gravecon al tiuj aspektoj, oni riskas alveni al postuloj pri sendependeco, do al danĝeroj je disigo. Se strebado al regiona aŭtonomeco kaj al regiona kultura identeco larĝiĝas ĝis postulo je propra ŝtata suvereneco, kun propra ekstera politiko kaj propra armeo, tiam ĝi fariĝas mikronaciismo. Do regionaj aŭtonomecoj en federacia kadro estas bonvenaj, tamen ili ne nepre baziĝu sur etnaj distingo. Krom etnaj trajtoj havu rolon ankaŭ ekonomiaj kaj historiaj faktoroj.

Pri la Eŭropa tavolo: el kio povas konsisti eŭropa identeco? Certe ne sur etna principo, alie ĝi fariĝus rasismo. Eŭropa identeco baziĝu sur la volo vivi kune, sur akcepto de ĝeneralaj principoj, kiuj naskiĝis en Eŭropo, sed fariĝis universale validaj. Tio estas respekto de la homaj rajtoj, libereco de opinioj, demokratio, regado je la diversaj niveloj laŭ principo de subsidiareco, laikeco de la ŝtato; krome karakterizo de Eŭropo estas la principo de socia solidareco, kio aparte diferencigas ĝin de la usona socio.

En la monda scenejo Eŭropo, federacie unuigita, estu portanto de paco kaj de libereco, ne lasante al la sola Usono la rolon de «ĝendarmo de la mondo», kiun ĝi neeviteble havas, se ĝi restas la sola granda demokratia potenco tutmonda.

Oni ne parolu pri «Eŭropa naciismo», ĉar Eŭropo ne estas kaj ne estos nacio en la senco de la nunaj naciaj ŝtatoj. Eŭropa Federacio bezonas havi de siaj civitanoj «eŭropan patriotismon», nome fidelecon al siaj principoj kaj lojalecon al sia konstitucio. Tion ĝi rajtos postuli ankaŭ de la nov-alvenintoj, la enmigrintoj de aliaj kontinentoj, por ke ili fariĝu «novaj eŭropanoj». Tion ĝi rajtos postuli kiel kondiĉon por aliĝo de novaj landoj.

Post-noto: Mi klarigu ke mi tute ne emas al dekstro (nek nova nek malnova). Mi konsideras min progresema demokrato, kiu – pri la distingo inter progresemaj kaj reakciemaj homoj – opinias ankoraŭ nun validaj la vortojn skribitajn de Altiero Spinelli, antifaŝisto kaj ekskomunisto, en la jaroj 1941-42 en la insulo Ventotene, kie li estis relegaciita de la faŝisma reĝimo:

«La disiga linio inter la progresemaj partioj tial falas jam ne laŭ la formala linio de pli granda aŭ pli malgranda demo-

krateco, de pli aŭ malpli granda socialismo starigota, sed laŭ la tre nova substanca linio, kiu disigas tiujn, kiuj konceptas kiel esencan celon de la politika lukto la malnovon, nome la konkeron de la nacia politika potenco... kaj kiuj faros, eĉ nevole, la ludon de la reakciaj fortoj...., disde tiuj, kiuj vidos kiel centran taskon la kreadon de solida internacia ŝtato, kaj kiuj direktos la popolajn fortojn al tiu celo». (El la *Manifesto de Ventotene*).

## novajoj

### Levsen/Lindner Serio: 705 artikoloj nun haveblaj

Meze de 1965 ĝis fino de 1990 en la GDR-gazeto *Der Morgen* seninterrompe aperadis artikoloj en kaj pri Esperanto, unue ĉiun semajnon poste ĉiun duan semajnon. La unuajn 185 artikolojn verkis Paul Lindner. La aŭtoro de la artikoloj 188-705 estis Peter Levsen. La serio, en la historio de Esperanto verŝajne unika, entenas diversspecajn kursojn kaj kursmaterialojn. Ĝi krome multe reflektis la Esperanto-movadon de GDR kaj raportis pri multo el la internacia movado. La Laborgrupo pri la historio de GDREA ĵus eldonis: Peter Levsen/ Paul Lindner (2002): *Die Esperanto-Serie in Der Morgen 1965 - 1990*. Zur Veröffentlichung vorbereitet von Ino Kolbe und Monika Ludewig. 3 A4-kajeroj, kune 600 p. kun aldonajoj. La kajeroj haveblas kontraŭ 18 eŭroj + afranko ĉe Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, 12683 Berlin, blanke.gil@snafu.de) (DB)

SAT en interreto – nun ĉe:  
<http://sat-esperanto.org/>

paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)

# La Socialisto

## Forte kontraŭ la sociala malvarmo

### Maja manifestado

Denove montris la viena sekcio de la Socialdemokrata Partio Aŭstria sian forton gardi la socialan sekurecon, marŝante sur la Ring-bulevardo. Ankaŭ ASLE partoprenis, kiel ĉiujare. Rigardu bonvole kelkajn fotojn.



ASLE salutas la gekamaradojn. Maldekstre: k-dino Helga Farukuoye



Antaŭ la urbodomo



La parti-estraro. Dua dekstre: Partiestro k-do Alfred Gusenbauer

### Viena partikferenco

La viena sekcio de la Socialdemokrata Partio Aŭstria konferencis en la granda viena konferenco-centro 'Austria Center Vienna'. Partoprenis ankaŭ delegito de ASLE. La konferenco celis firmigi la batalemo de la parti-membraro kontraŭ la 'nigre-blua' aŭstria registaro (ÖVP-FPO), kiu ege damaĝas Aŭstrion.

Jen la resumo de la paroloj de la eminentuloj:

#### K-do Alfred Gusenbauer, tutaŭstria partiestro:

Nin ĉagrenas, ke pli kaj pli radikaliĝas la socio, ekzemple en Francio. Ankaŭ en Aŭstrio malpliboniĝas la politika klimato. Jörg Haider rolas ofendito, la ÖVP forlasas la politikan mezon kaj glitas dekstren. Ciniko regas la komunikon. La promeson de impostredukto ni taksu danĝera minaco, ĉar post tiaj promesoj en la pasinteco sekvis altiĝoj de impostoj. Ni socialdemokratoj ne volas kaj ne toleros 'kubutan socion'. La impostreformoj fariĝos kvazaŭ rigora ekzameno de la registaro.

### Renaskiĝo de Esperanto en Tirolo?

Tirolo havas longan tradicion de la internacia lingvo Esperanto. Pluraj E-grupoj kaj kursoj ekzistis inter la du mondmilitoj kaj ankaŭ en la jaroj poste. Bedaŭrinde, la Esperanta vivo pli kaj pli ekdormis. La tirolanoj lernis la anglan lingvon kaj aliajn lingvojn, kiujn ili bezonis por servi al siaj eksterlandaj gastoj. Restis kelkaj individuaj Esperantistoj kaj la Esperanto-kursoj, kiujn faris la ŝatata universitata profesoro d-ro Hermann Ölberg. Pere de la varbado por ĉi tiuj kursoj kaj publika laboro – artikoloj en

#### K-do Michael Häupl, viena urbestro:

La strategio de la dekstrularo estas: interpacigi la maldekstran opozicion kaj tiel malfortigi ĝin. Fantomumas en Eŭropo, kaj tiun fantomon ni devas kontraŭbatali. Ĥaosismaj sektuloj ne havas lokon en nia movado. La oka de majo, la tago de la liberiĝo de la nazia reĝimo, ne estas tago de funebro, kiel kelkaj asertas. Funebraj manifestacioj je tiu tago estas malpermesendaj.

Estas stranga afero, ke Jörg Haider faris sian propran advokaton ministro de justico. Tiu homo, Böhmdorfer, agis kiel bona advokato: li defendis sian klienton. Estas granda diferenco inter parolo kaj faro de la registaraj partioj. Ni socialdemokratoj ne toleros socialan reduktion en Vieno. Ne sufiĉas nur administri, necesas politike agi.

La partikferenco decidis agi pli forte por la interesoj de virinoj, junuloj kaj minoritatoj, kiel ekzemple samseksaj paroj.

gazetoj, elsendoj en la televido kaj en la radio, informado en la interreto – kreskis la intereso por Esperanto kaj la kursoj ĉe la universitato Innsbruck. La ricevita eĥo pravigas la esperon, ke baldaŭ ekzistos nova Esperanto-asocio en Tirolo. Nuntempe la aktivuloj prezentas sin sub la nomo:

Tuttirola Esperanto-Grupo.

Por gajni plu membrojn kaj fortojn, la projekto entenas la tutan landon Tirolo en la historiaj limoj kaj samtempe la Eŭropan regionon Tirolo.

Membroj kaj kunlaborantoj estas serĉataj!

**La Tuttirola Esperanto-Grupo**

Projekto por la fondo de Esperanto-Asocio por la Eŭropa regiono Tirolo (t.e. la Federacia Lando Tirolo, la Lando Sudtirolo kaj la Provinco Trentino). Por pliaj informoj vizitu nian hejmpaĝon ĉe <http://www.tirolo.org>.

Geinteresitoj turnu sin al: D-ro Klaus Karner, Krebsbach 371, A-6414 Mieming, <[dr.klaus.karner@utanet.at](mailto:dr.klaus.karner@utanet.at)>

D-ro Karner

**Scienca Semajno – publika minikurso de Esperanto**

De la 7-a ĝis la 16-a de junio la aŭstria universitato prezentis siajn sciopovojn en la Scienca Semajno; en ĝia kadro la Lektorato por Interlingvistiko (Planlingvoj) de la Universitato de Innsbruck organizis sabate, la 15-an de junio, Mini-Esperantokurson. Pere de malgranda multmedia elmontrado la geinteresitoj, kiuj partoprenis malgraŭ la belega kaj ege varmega vetero, ricevis enrigardon en la naturon, la celojn, la praktikon kaj la futuron de Esperanto. La kursestro invitis la gepartoprenantojn al la venonta Esperanto-kurso, kiu komenciĝos la 3-an de oktobro 2002 ĉe la Universitato de Innsbruck.

D-ro Karner

**Poŝtaŭtobuso – forta partnero de Esperanto**

En la biblioteko de la Lektorato por Interlingvistiko (Planlingvoj) de la Instituto por Lingvoj kaj Literaturoj, Sekcio Lingvistiko, de la Universitato de Innsbruck troviĝas ja multaj libroj kaj gazetoj, sed ĝis nun mankis bona instrumaterialo. Ĉi tiun mankon forigis nun la AŭSTRIA POŝTAŬTOBUSA AKCIA SOCIETO / ÖSTERREICHISCHE POSTBUS-AG. Ĉi tiu tradicioplena entrepreno

donacis al la lektorato enhavoriĉajn studotekojn. La tekoj entenas lernolibrojn, gramatikon, amuzan libron por la legado dum la kursoj kaj kompaktdiskojn kun brazila interreta Esperanto-kurso (<http://www.cursodeesperanto.com.br>).

La transdonado de la studmaterialo okazis la 15-an de junio 2002 en la kadro de la Scienca Semajno. La gazetara parolisto de la Tirola Poŝtaŭtobusa entrepreno, Johann Kapferer, akcentis en sia mallonga parolado la servojn de la Poŝtaŭtobuso por la turismo. Li diris, ke la ŝoforoj de la poŝtaŭtobusoj povus pli bone servi al siaj eksterlandaj pasaĝeroj, se oni mondvaste uzus Esperanton kiel komunikilon. D-ro Klaus Karner, la universitata lektoro por Esperanto, dankis por la tre ŝatataj donacoj. Li vidas paralelecon inter la Aŭstria Poŝtaŭtobuso, kiu servas al la loĝantaro de 95 jaroj kaj la sukcesa mondlingvo Esperanto: Ambaŭ, la iama Aŭstria Poŝtadministracio kaj d-ro Zamenhof, la fondinto de la Esperanto, faris vastevidan pioniran laboron. Multaj el niaj gestudentoj ŝatas la poŝtaŭtobuson kiel fidindan partneron en transportado; la subtenado de la universitato kontinuuigas sukcesan kunlaboron.

La studmaterialo taŭgas ankaŭ por la memstudado. Ĉiu persono povas pruntepreni la materialon (adreso: Universitato Innsbruck, Instituto por Lingvoj kaj Literaturoj, Sekcio Lingvistiko, Lektorato por Interlingvistiko (Planlingvoj) en A-6020 Innsbruck, Innrain 52).

D-ro Karner

La **LEAG-Magazino** aperas ankaŭ en interreta eldono, kiu inkluzivas – ni pardonpetas pro la lastatempa malfruigo de la enretigo – grandan parton de la enhavo de la papera eldono: <http://home.arcor.de/gmickle/leag/index.html>

Ĉi tiu artikolo estas ĉerpita el la TTT-ejo de la nederlanda grupo *De Fabel van de illegaal* (kaj tradukita de GM). Jen kelkaj klarigaj eldiroj de la grupo mem: "Por malfermitaj landlimoj: *De Fabel* estas radikalmaldekstra baznivela organizaĵo. Ni alstrebas libersocialisman kaj feminisman socion sen rasismo, naciismo aŭ faŝismo. Tio povas veni nur per fundamenta transformo de la sociaj kaj proprietaj rilatoj je monda skalo. Internacia solidareco tial staras en la centro. *De Fabel* provas doni al la solidareco konkretan formon per la lukto komune kun kaj por migrantoj kaj fuĝintoj." Indas aldoni, ke *De fabel* liveras valorajn sciojn ankaŭ pri novtipaj, t.e. novdekstraj naciismaj tendencoj. Ĝia TTT-ejo ĉe [www.defabel.nl](http://www.defabel.nl) havas legindaĵojn ankaŭ en la germana, angla, franca, itala, sveda – kaj plej laste aldonite – en Esperanto.

**Pintkonferenco-saltado kontraŭ «tutmondiĝo»**

de Eric Krebbers

Se temas pri «tutmondiĝo», ĉiu sentas sin alparolita. Sufiĉas nur esti kontraŭ ĝi, kaj la svaga imago pri la enhavo de tio alkonformiĝas senprobleme al la propra mondrigardo. Unusignifa difino de la termino «tutmondiĝo» ne ekzistas. Kiel ajn malmulte ĉi tiu senfokusa nocio povas helpi plupaŝi en la maldekstra analizo, tiel multe ĝi tamen laŭmodiĝis. Kiu okupiĝas pri «tutmondiĝo», transprenas aŭtomate ideajn enhavojn, en kiuj nocioj kiel «libera komerco» kaj «internacia kapitalo» centre rolas. Firma internacia kontraŭtutmondiĝa movado ne ekzistas. Multaj aktivistoj ĉe kontraŭpintkonferencoj en Seattle kaj Prago tamen dividas la kontraŭtutmondiĝan pensadon.

La nova modvorto estigas ĉiajn asociadojn. «Tutmondiĝo» sugestas ekzemple, ke la kapitalismo estis origine loka afero kaj nur antaŭnelonge etendis siajn «tentaklojn» (se resti en la tipa ĵargono) al la tuta mondo. Oni ankaŭ supozas principan kontraŭdiron inter la ŝtato kaj la kapitalo, lige kun kiu multnaciaj konzernoj ĝuste nun atakas la suverenecon de la naciaj ŝtatoj. La negative ŝarĝita

nocio «tutmondiĝo» kreas ankaŭ la impreson, ke la loka nivelo estas ĉiam ajn la pli bona. Pro tio, multaj aktivistoj emas diferencigi inter la bona «loka kapitalo» kaj la «malbona internacia kapitalo».

La kapitalismo estis ja ĉiam tergloba afero. En la komenco troviĝis la ekspluatado de la kolonioj. La kapitalo kaj la modernaj ŝtatoj apartenas kune kaj bezonas unu la alian. Ŝtatoj kreas la premisojn por la ĉiam pli disvolviĝanta kapitalismo. Ili garantias proprietajn rajtojn, krome ankaŭ la kontroladon kaj la disciplinadon de la loĝantaro. Tial naciaj ŝtatoj laboras komune kun entreprenoj je traktatoj pri libera komerco. Same, la supozata fundamenta diferenco inter la «loka produktado» kaj la «internacia komerco» estas pensfantomo, ĉar ambaŭ estas nur malsamaj aperaĵoj de la kapitalo.

Kontraŭtutmondiĝaj aktivistoj koncentriĝas je la por hodiaŭaj maldekstruloj laŭdire plej grava intertendenca batalo inter du frakcioj interne de la ŝtato kaj la kapitalo, inter la proparolantoj de la tutmondiĝo unuflanke,

kiuj postulas pli da potenco por internaciaj institucioj kaj entreprenoj, kaj la advokatoj de suverenaj ŝtatoj kaj projektistoj de naciaj entreprenoj aliflanke. Sed kiu metas la internajn konfliktojn de la kapitalo en la centron de atento, problemigas konflikton de la elito, kaj dum tio la batalo de subprematoj kontraŭ ekspluatistoj eliras el la rigardokampo. Kaj jam denove la historio ŝajnas esti io, kion oni okazigas desupre. En la konsekvenco, tia perspektivo kondukas al mobilizo de aktivistoj okaze de renkontiĝoj de la elitoj. En Nederlando oni nomas tiun agadformon «tophoppem», t.e. «pintkonferenco-saltado». Kvankam ilia influo estas malgranda, la agadgvidantoj rigardas la manifestaciojn kiel sukcesajn, kiam malebliĝas la farado de decidoj pri internaciaj labordivido ĉe tiuj pintkonferencoj.

### Internacia Forumo pri Tutmondiĝo

La nuntempaj manifestacioj kaj kontraŭkonferencoj montras malmulte da parenceco kun la protestoj kontraŭ la Monda Banko, IMF kaj G7 de la 80aj jaroj. La nova ondo estiĝis meze de la 90aj jaroj, instigite de la NAFTA-traktato pri libera komerco. Sekve de ĝi, formiĝis du movadoj, unu de neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj) kaj unu de baznivelaĵoj.

Kiel la iniciatinton de la NRO-movado oni konsideras la Internacian Forumon pri Tutmondiĝo (IFG), kiu havas firman pozicion en Usono kaj estas reto de ĉ. 60 aktivistoj, sciencistoj kaj opinifaristoj, kiuj reprezentas entute 40 NRO-ojn en 20 landoj. La IFG ne vidas la problemon en la kapitalisma sistemo aŭ en la patriarkismo, sed en la falo de lokaj ekonomioj, religioj kaj kulturoj. Multe da IFG-membroj elpaŝas kontraŭ la tekniko kaj la progreso. «Totala re-

organizo de la mondaj ekonomio kaj politiko plenumiĝas samtempe kun la tuttera transpreno de la regpovo fare de multnaciaj entreprenoj kaj internaciaj komercburokratioj.» opinias la IFG. Oni ellaboris strategiojn kontraŭ la «nekontrolebla tergloba kapitalo» kaj organizis kontraŭ-pintkonferencojn. La IFG alprenis la publikan bildon de «nek maldekstra nek dekstra», por ligi al la movado krom la maldekstruloj ankaŭ konservativulojn, naciistojn kaj la Novan Dekstrularon.

IFG-membro Lori Wallach de la usona konsumanto-organizaĵo kaj medio-organizaĵo Public Citizen (PC) [Publika Civitano] en 1997 eligis la startsignalon por la internacia kampanjo kontraŭ la MAI-traktato pri libera komerco, kiam ŝi publikigis en la interreto la ankoraŭ «sekretan» koncepton de ĝi. Okaze de pli postaj kampanjoj kontraŭ NAFTA, MAI kaj MKO [WTO], PC kunlaboris kun la dekstraj politikistoj Pat Buchanan kaj Jesse Helms. Ankaŭ la IFG-membro Maud Barlow de la Council of Canadians [Konsilio de Kanadanoj], kiu protestas kontraŭ la «forvendo de Kanado al usonaj entreprenoj», kaj Susan George, ankaŭ IFG-membro kaj intertempe la internacia vicprezidantino de ATTAC, kiu volas per la Tobin-imposto limigi la «spekulaciajn kapitalkurentojn», partoprenis ĉi tiujn danĝerajn koaliciojn. George propagandis en sia libro *Lugano-raporto* la konspirteorion pri grupo de entreprenistoj kaj sciencistoj.

Kiel elstaran IFG-membron oni konsideras ĝian kunfondinton Edward Goldsmith. La arkikonservativa brita milionulo, posedanto kaj eks-ĉefredaktoro de *The Ecologist*, partoprenis dum la pasintaj tridek jaroj la fondon kaj financan subtenadon de i.a. Amikoj de la Tero, la angla Verda Partio, Survival Inter-

national [Pluvivo Internacia] kaj Ecropa. Samtempe li tenadas intimajn rilatojn kun la pensfabrikoj de la franca Front National kaj la belga Vlaams Blok, kie liaj ideoj pri la «estigo de la natura socia ordo» kaj la apartigo de la «diversaj etnoj» ricevas fortan konsenton.

### Peoples' Global Action

La insurekcio de la zapatistoj la 1an de januaro de 1994 staris sub la signo de NAFTA. Kiel sekvo de la Interĝalaksiaj Renkontiĝoj, kiujn ili organizis, evoluis la internacia reto «Peoples' Global Action against Free Trade» (PGA) [Popola Tergloba Agado kontraŭ la Libera Komerco] el aro de grandaj baznivelaĵoj organizaĵoj en la sudo kaj kelkaj grupoj kaj unuopuloj en Eŭropo. Tie la de la IFG disvastigataj apokalipsaj konspirakontoj pri la sekreta «nova monda konstitucio» nomata MAI trovis aŭskultantojn kaj igis la kontraŭtutmondigan movadon rapide ekkreski. La entuziasmo tamen ne staris sur la fundamento de iuj pli profundaj politikaj analizoj. Dum la aktivistoj de la NRO-oj estis priŝutitaj per informoj, maldekstraj starpunktoj retroiris en la fonon. Pro la malaltaj grado de kaj preteco je organiziĝo, politika diskuto pri la direkto de la kampanjoj apenaŭ povis esti iniciatita. Pro tio oni traktis la kontraŭ-pintkonferencojn kiel la solajn orientantojn de la movado. Krome, ĉiuj ĉepinte irantaj eŭropaj grupoj de la nova movado kunlaboris kun Goldsmith, kiu disdonis multe da mono inter ili.

Ankaŭ en Nederlando diversaj organizaĵoj komencis kontraŭtutmondigajn kampanjojn. La kontraŭrasisma grupo «De Fabel van de illegaal» gvidis ekde 1997 la Sekretariejon de la kampanjoj kontraŭ la MAI-traktato kaj – pli poste – kontraŭ la MKO. Regule anoncis sin

pertelefone fundamentismaj kristanoj, antisemitoj, konspirfantaziuloj kaj dekstruloj, kiuj aperis ĉe diskutrenkontiĝoj kaj uzis artikolojn en siaj komunikiloj. Antisemitoj ŝajne devis, aŭdante historiojn pri la konspiro de la «internacia kapitalo», aŭtomate pensi «juda». Ankaŭ la unuflanka intereso pri personoj el la elito, kiuj ĉeestis en la pintkonferencoj, anstataŭ pri strukturoj, bone kongruis kun iliaj antisemitaj pensmanieroj. La postulata memdeterminado de naciaj ŝtatoj kaj popoloj kontraŭ la «internacia kapitalo» estis senprobleme interpret-ebla en la kunteksto de ekstremdekstraj vizioj pri fortaj aŭtonomaj ŝtatoj. Neintence, maldekstraj aktivistoj disvastigis pensaron, kiu kontribuis al la akceptiĝo de ekstremdekstraj vidpunktoj.

### Novdekstruloj

De Fabel van de Illegaal provis doni al la kampanjo maldekstran pezocentron, for de la «libera komerco» en la direkto de kontraŭrasismo kaj kontraŭpatriarkismo, kun temoj kiel la internacia loĝantarpolitiko, kontraŭleĝigo de rifuĝantoj kaj migrantoj, kaj virinoj en zonoj de libera komerco. Sed ŝajnis, ke tiuj temoj ne povis esti ligitaj al la kritiko kontraŭ «tutmondiĝo» kaj «libera komerco». La radikalmaldekstra starpunkto en la senco de kompleksa kapitalismokritiko ne venkis ene de la kontraŭtutmondiga movado. Tial De Fabel retirigis el la kampanjo. Pro la forta kritiko, la PGA tamen pliriĉigis la punktojn de sia principaro per ĝenerala kritiko de la kapitalismo (anstataŭ kritiko je «libera komerco») kaj de la antisemitismo.

Sed la almeto de kelkaj novaj elementoj al la ideologia kunteksto de «tutmondiĝo» ne sufiĉas. Kontraŭtutmondigaj aktivistoj, kiuj kritikis la kapitalismon, dum ili postĉasas la inter



si disputantajn elitojn, restas tamen agantoj interne de la sama ideologio. Tio validas ankaŭ rilate al tiuj, kiuj, eĉ se ili ne plu «saltas» inter pintkonferencoj, tamen plu operacas per la samaj nocioj «tutmondiĝo» kaj «libera komerco». Tiuj nocioj lokiĝas pli en la tradicia dekstra pensado pri internaciaj konspiroj kaj disputoj inter «etnoj». Eĉ la emfazado de la propra kontraŭnaciismo en pamfletoj ne helpas, ĉar nocioj kiel «tutmondiĝo»

## Forpasis Nikola Aleksiev

de Delev Blanke

En sia 93-a vivo-jaro, dum periodo de plena aktiveco, forpasis unu el la plej gravaj personecoj de la bulgara sindikata movado kaj de la postmilita Esperanto-Movado: Nikola Aleksiev (29.6.1909-19.7.2002).

Li naskiĝis kiel oka filo en familio de malriĉa bulgara ŝufisto en la nord-okcidenta urbo Berkovica kaj akiris siajn politikajn konvinkojn en tre komplika kaj prema periodo de la bulgara historio, dum kaj inter militoj, malsatoj kaj politikaj persekutoj. Tre frue li aliĝis al la Bulgara Komunista Partio (i.a. estis sekretario de konspira distrikta komitato), agadis por sindikatoj, estis persekutita kaj enprizonigita almenaŭ 6 jarojn kaj torturita tiom, ke oni devis lin liberigi kaj por ne lasis morti, meti en malsanulejon. Tia vivo lin klare stampis kaj donis al li grandan forton por vastega kaj multflanka agado por la realigo de la socialisma idealo. Post kelktempa studo de agronomio, kiun li devis ĉesi pro politika persekuto, li fariĝis ĵurnalisto kaj dum tiu periodo i.a. konatiĝis kiel redaktoro de diversspecaj revuoj: i.a. maldekstra studenta semajngazeto *Studentska tribuna*, maldekstra-sindikata (*Edinstvo*

aŭtomate trudas al aliaj dekstrajn kaj nacilismajn pensmodelojn. Ĉiu kampanja temo kaj ĉiu agado elvokas tian metapolitikan efekton. Tion maldekstraj aktivistoj devas pli konsideri. La Nova Dekstrularo jam antaŭ longa tempo komprenis tion. Tie oni scias, ke la metapolitika, nereakta efiko de la agado de malgrandaj movadoj estas multe pli granda ol la senpera influo al la sociaj potencrilatoj. [trad. de GM]

[Unueco] kaj kontraŭfaŝista (*Antifaŝist-ski front* por liberigo de Dimitrov). Post la venko de la antifaŝista ribelo en Bulgario (1944) li fondis la semajnan gazeton *Zname na truda* [Standardo de la laboro] kaj ĉefredaktoris la ĉiutagan oficialan organon de la bulgaraj sindikatoj *Trud* (Laboro). Inter 1948-1962 Nikola Aleksiev apartenis al la gvidantaro de la bulgara sindikata organizaĵo kiel ties sekretario kaj krome laboris kiel vicprezidanto de la ĉefa bulgara organizaĵo por kulturaj rilatoj kun eksterlando. Li krome havis multajn funkciojn en ŝtataj kaj kulturaj organizaĵoj (vicprezidanto de la bulgara pacorganizaĵo, vicmembro de CK de Bulgara Komunista Partio). Cetere, el multaj privataj interparoloj kun li mi scias, ke li estis tre kritika pri la diversaj fenomenoj de persona kulto kaj la malutila agado de mallarĝhorizontaj politikistoj en kelkaj socialismaj landoj, kio inkludas la propran.

Kiel juna komunisto inter 1924-25 li lernis Esperanton kaj poste iniciatis la fondon de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA, 1930), kies sekretario li estis. Li redaktis la organon de BuLEA *Balkana Laboristo* kaj krome lige al Es-

peranto en la bulgara la revuojn *Mejdunaroden jezik* (Internacia Lingvo) kaj *Mejdunaroden rasbselkor* (Internacia laborist-kampanara korespondanto, revuo nutrita nur per laboristesperantistaj korespondaj materialoj, vaste legita en Bulgario).

Kiel apenaŭ alia per sia politika influo, sia sindediĉa agado surbaze de ne-skueblaj konvinkoj, larĝaj scioj kaj riĉa dozo de specifa lerteco, la forpasinto helpigis en la rekonstruado de la Esperantomovado en Bulgario, aparte ekde 1964 post lia pensiuliĝo (i.a. kiel prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio 1964-1976) kaj, tre rimarkeble, en diversaj orienteŭropaj landoj, kie ĉe ŝtataj aŭtoritatoj li estis estimata kiel pruvo por la seriozeco de Esperanto kaj ĝiaj politikaj aplikobloj, kion i.a. simbolas neesperantistaj altaj kulturaj kaj ŝtataj ordenoj de Bulgario kaj eksterlando (i.a. de Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Vjetnamio). Internacie li aparte konatiĝis kiel prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, MEM (1983-1978, poste honora prezidanto), komitatano de UEA (1963-1980) kaj kiel ĉefa motoro de la sistema evoluigo de la kunlaboro inter Esperanto-organizaĵoj en la siatempaj orientblokaj landoj (i.a. per 22 Konsultigoj 1969-1989). Kaj daŭre li multege verkis (elekta bibliografio el la jaro 1998 registras 347 erojn). Per sia agado Nikola Aleksiev grave kontribuis al la kvanta kaj kvalita plifortigo de la movado en tiu regiono, al la fondo de novaj organizaĵoj, al la forigo de malhelpoj kaj antaŭjuĝoj venintaj el la stalina epoko. Li multe kunlaboris en la redaktado de *Bulgara Esperantisto*, *Paco*, *Pacaktivulo* kaj aliaj periodaĵoj. La Universala Kongreso de UEA 48-a (1963, Sofio) kaj 63-a (1978, Varna), kies LKK-prezidanto li estis, apartenas al la plej grandaj kaj rimarkindaj en la historio de Esperanto.

En malfacila historia periodo de UEA dum la 70-aj jaroj Aleksiev per sia vasta klero, profunda esperantisteco, diplomata talento kaj elasta kunlaboremo grave helpis restabligi la asocion kaj – malgraŭ foje malsamaj politikaj pozicioj – gajnis la estimon kaj admiron de tiuj, kiuj kunlaboris kun li. Ne senkaŭze la Komitato de UEA al li donis la honoran membrecon (1980). Aleksiev verkis en Esperanto kaj en la bulgara centojn da artikoloj kaj kelkajn librojn kaj tradukis el la rusa, el Esperanto kaj el la franca. Li estis brila oratoro kaj ĉiam afabla, specife anekdotema diskutpartnero.

La lastjardecaj politikaj ŝanĝoj, ankaŭ por li drastaj, ne povis skui liajn bazajn konvinkojn. Ĝis la lasta tago li konservis sian viglan menson kaj seninterrompe verkis kaj publikigis i.a. pri la nuntempa evoluo en Bulgario. Kiu konatiĝis kun tiu ĉiam modesta kaj varmkora homo, kiun la grava bulgara verkisto Georgi Karaslavov iam nomis "ĉizelita ŝtono" (verkinto de *La bofilino*), tiros inspirojn el lia vivo kaj agado, ne kapitulacos antaŭ historiaj malvenkoj kaj ne forgesos lin.

novaĵoj

**Zofia Banet-Fornalowa pri Grabowski**  
Aperis 140-paĝa monografio pri la vivo kaj laboroj de la *patro de la Esperanta poezio* Antoni Grabowski. La leganto povas informiĝi ne nur pri la rolo de Grabowski kiel poeto, organizanto kaj defendanto de Esperanto, sed ankaŭ pri ne ĝis nun larĝe konata implikiĝo de Grabowski (kaj Esperanto) en la politiko de la tiam ankoraŭ ne sendependa Pollando. Zofia Banet-Fornalowa: *Antoni Grabowski – eminenta Esperanto-aganto*, eldonejo Hejme, Varsovio 2001.

## Edukmaniero

de Ivan Trifonov Minčev

Kiel respondeculo de financa, akciza kaj valutkontrolo dum la t.n. «Stalina periodo», mi estis ofice devigita foj-foje vizitadi iujn loĝlokojn en la regiono. Tiamaniere mi ekkonis iujn urbestrojn kaj vilaĝestrojn, eĉ amikiĝis kun ili.

Konato – vilaĝestro laŭdis sin, ke li posedas belegan, riĉe meblitan domegon kaj invitis min gastigi en lia hejmo. Mi nek akceptis, nek rifuzis la inviton. Dum bela printempa tago mi kun stiristo, veturante ĉirkaŭ la vilaĝestra domo, decidis trarigardi ĝian eksteron.

Feliĉe, aŭ male, en la antaŭdoma florgardeneto tuj aperis la dommastro-vilaĝestro. Evidente ege konfuzita, li invitis nin sidiĝi antaŭ la domo, promesante alfoje, dum oportuna tempo montri al ni domegan internajon. Ni sidiĝis inter florojn. Li prenis malplenan vinkruĉon, iris al kelo malantaŭ la domo, por doni vinon – regali nin kiel gastojn.

Dume, samtempe mi aŭdis subpremitan murmuradon kun ploro.

Pro intuicia sento mi ekrigardis tra la duonfermita pordo kaj konsternita vidis knabon alkatenitan al litego. Preskaŭ flustre mi demandis «pro kio?». La knabo larme, rapide respondis: «Mi kun du amikoj pro scivolemo kaŝe vizitis noktadon en preĝejo okaze de Pasko. Mia patro eksciis nian misagon kaj severe punas min. Li timas, ke pro malsufiĉa ateisma edukado de lia filo, la partia estraro maldungos, eksigos lin, tiel ke mi kulpos pro lia fiasko.» Post tia infana konfeso mi tuj eliĝis, denove sidiĝis inter florojn.

La dommastro revenis kun plena vinkruĉo kaj glasoj por regali tuj la neatenditajn gastojn. Mi nur gustumis,

dankis pro la bongusta vino kaj forveturis senforte pri la ekviditaĵo.

Veturante, mi komentis la blindan partian fanatikecon de tia vilaĝestro. Bedaŭrinde, similaj gvidantoj – mentoroj kun analogaj edukmanieroj abundis tutlande.

## novajoj

### Internacia Konferenco pri Solidareco "i2002"

La interreĵo de la Internacia Konferenco pri Solidareco "i2002" estas rigardiinda:

<http://www.fau.org/i2002/eo/start.html>. Ĝi estas

plejparte esperantigita. I2002 estas Internacia konferenco pri solidareco por sindikatistoj el la tuta mondo, kiu okazas en la urbo Essen (Germanio) inter la 29a de aŭgusto kaj la 1a de septembro 2002. La konferenco estas dediĉita al interŝanĝo de spertoj en laboristaj luktoj kaj al plibonigo de mondskala komunikado kaj solidareco ĉi-rilate. Grandan spacon oni dediĉas al konkreta interŝanĝo de spertoj.

Ĉi tiuj principoj estas partoprenpremisoj:

1. La klaso de tiuj, kiuj devige vendas sian laborforton (t.e. la gelaborista klaso), havas nenion komunan kun la klaso ekpluatanta.
2. La gelaborista klaso devas memstare organiziĝi por kontraŭbatali la klason ekpluatantan.
3. La plej grava batalrimedo de la gelaborista klaso estas la rekta, senpera agado.
4. Nur la gelaboristoj povas entombigi la tutmondan sistemon de kapitalisma ekspluatado.

Al la prepara komitato apartenas esperantisto kaj estis antaŭvidita la partopreno de pluraj Esperanto-parolantoj. (W. Firth / i2002-TTT-ejo)

La sekvantan raporton sendis al ni nia franca SAT-amiko Petro Jayer, kiu – nun preskaŭ 80-jaraĝa – kiel juna homo travivis terurajn monatojn en germana koncentrejo. Ĝi aperis en *La kosmopolito* de junio 1946.

## Rememoroj . . .

de Petro Jayer

Dolĉaj printempaj matenoj ... Rozkoloraj sunleviĝoj ... Tra ravaj ĝardenoj serpentumis la vojeto, niajn kapojn karesis la florsarĝitaj branĉoj; q! tiu ebrilga parfumo de la blankaj ĉerizarboj! ... REMEMOROJ .....

En la granda silento, niaj lignoŝuoj ritme frapadis la teron, de la birdoj timigitaj ĉesis la gajaj kantoj al la nova tagiĝo ... Horizonte, koloriĝis la altaĵoj de la Alpoj. Ol tiuj fieraj supraj eterne kovritaj de neĝo, simbolo de libero! ... Malsupre, en la valo, mistera nebulo vualis la ankoraŭ dormanfan Danubion! ...

Sajnis al mi ke la riĉa Naturo disetendis ĉiujn siajn plej grandiozajn trezorojn speciale por mi k aŭde mi admiris ilin.

Ol kiom bonfaraj estis la konsoloj de tiu grandkora patrino! ... mi ne plu frostis, ne plu malsatis, nek sentis la pezan lacecon, mi eĉ forgesis mian mizeran sklavecon, mi estus marŝinta tiel, dum horoj! ne plu aŭdante la funebran bruegon de la lignoŝuoj k la terurigajn kriojn de la SS.-gardistoj, nek la stertorojn de tiuj, kiuj falis ... Ofte, mi enviis ilin, oni sternigis ilin sur la freŝa tapiŝo, piede de la arboj, ili ripozis la tutan tagon, la birdoj koncertis por ili k la floretoj bonodore portis al ili la lastan adiaŭon de la tero ...; vespere, ni retrovis iliajn kadavrojn delikate kovritaj de blankaj petaloj k ĝin trenis supren en la inferon ... la brulanta faŭko de la krematorio baldaŭ ŝanĝis ilin en nigra fumo, kiu suprenfliris en la krepusko k iris amindumi kun la suboj ...

K post multaj matenoj tiaj, post multaj vesperoj senesperaj, seŭfinaj horoj de kruela atendo, terura

noktoj de angoro, dum kiam mi kredis tuŝi la „fundon de l'mizero“, la granda miraklo subite okazis...

La blankaj veturiloj de la Ruĝa-Kruco haltis en la Tirola-vilaĝeto! Mi ne povis atendi tiun promesitan vespermanĝon, la unuan bonan nutraĵon de post monatoj... ĝi ne plu allogis min! malgraŭ la severaj ordoj, mi eskapis, k kuris sur la straton nur duonkonscie; mi volis certiĝi ke mi vere fariĝis denove libera homo, mi paŝis tien k reen tra la herbejoj, mi sentis en mi la frenezigan ĝojon de hundo ĵus senkatnigita! mi kriis ĝin al la steloj, al la nokto, mi dankis la naturon pro ĝia ĉeesto al mia festo! mi ĝuis nepriskribeblan horon de plena feliĉo, la unuan horon de la retrovita libereco... longtempe mi vagadis tiel k fine kuŝiĝis apud rivereto... Tie la radiantaj suno vekis min el miaj sonĝoj k anoncis al mi de super la montoj la unuan liberan matenon!...

Kiom da esperoj senluma amasiĝis en mia koro tiam! Libero! Paco! abundo! tiuj vortoj senĉese dancadis en mia brulanta cerbo, k ĉirkaŭ ilia rondo ruliĝis la brilantaj sonĝoj pri estonto de frateco, de bela nova vivo!...

Forpasis la arda ebrieco, neniam plu mi konos ĝin denove, la reala vivo krude forbalais unu post la aliaj miajn iluziojn, tiam post tiam mi sentis mian liberegon malgrandiĝi k jam katenoj novaj pretiĝas, for la sonĝoj pri paco, pri interfratiĝo, pri feliĉa mondo estonta! La mortrondo baldaŭ rekomencos, baldaŭ ruinoj amasiĝos apud la nunaj, k la postvivantoj de ia lasta katastrofo intermordiĝos pli furioze ankoraŭ.

Estis do ĉio nur teatraĵo? nur provo eble de la fina tragedio kiu englutis la homaron laŭ ĝia propra volo k konsento?

Kamaradoj, vi, kiuj por ĉiam endormiĝis en la ravaj matenoj sub la florantaj arboj, ofte mi envidas vin.

Denove printempas, denove la fidela Naturo revenas kun siaj ravaj belajoj. Sed ho ve, malpliĝis miaj esperoj, kiuj tiam feliĉiĝis min en la momento de liberiĝo en la valo de Mauthausen.

## Eminente esperantisto - elstara lingvonaciisto

de Gary Mickle

«Estas precipe la laŭmoda senkritika akceptado de primitivaj anglismoj, aparte usonismoj, kiu endangerigas la kroatan lingvon...»<sup>1</sup> Ĉu konata refreno? Verŝajne jam neniu esperantisto, almenaŭ en Eŭropo, maltrafis similajn eldirojn en la movada gazetaro aŭ en la reto. En la lasta numero de *Esperanto* Anna Ritamäki<sup>2</sup> laŭdas la verkon *Brilu ĉiu lingvo samrajte!* de L. Gados, kies tezo estas, ke leksika pruntado – ĝuste el la angla – kaŭzas «damaĝon» al etna lingvo, kiu «manifestiĝas en tio, ke kelkaj aŭ multaj elementoj de la kulturo kaj ĝia lingvoparto de la etno anstataŭiĝas per kulturaj (lingvaj) elementoj de alia etno». Kelkaj observantoj, al kiuj mi apartenas, nomas tiajn tezojn naciismaj, dum aliaj kredas ilin trafaj argumentoj por Esperanto.

Indas ekzameni aliajn kazojn de lingva purismo. Eble tio helpas respondi la demando, ĉu tiu diskurso jes aŭ ne estas naciisma. La eldiro citita komence de la artikolo rilatas al la influo de la angla al la kroata. Ĝia aŭtoro, Dalibor Brozović, estas la prezidanto de la Kroata Esperanto-Ligo, kaj li esence regurdas ideon, kiu fariĝis preskaŭ la «partia linio» en multaj partoj de la movado. Sed Brozović agadas unuavice sur tute alia fronto de la batalo por «purigitaj» etnaj lingvoj. Ĝi estas fronto, kiun

<sup>1</sup> citita en M. Jurišić: «Je li izgubljena bitka s anglizmima» en *Večernji list* de 2002-03-13

<sup>2</sup> A. Ritamäki: «Pledo por la gepatraj lingvoj vekas atenton» en *Esperanto* de 2002-07/08, p. 160

sendube multaj esperantistoj ne konas kaj eble ne volas koni.

Dalibor Brozović estas kaj esperantisto kaj renoma lingvisto (leksikologo) – kaj unu el la lingvonaciistoj, kiuj komence de la 90aj jaroj ellaboris kaj propagandis en la gazetaro de Kroatio la oficialajn rekomendojn, per kiuj oni «kroatigas» la landan lingvon. Oni anstataŭiĝis per «etne purigita» lingvo la antaŭan serbkroatan (aŭ kroatserban) normlingvon, antaŭe komunan al Kroatio, Serbio kaj Bosnio.

Komence de la 90aj jaroj Brozović estis altranga politikisto de la tiam reganta kroata partio HDZ kaj havis altajn ŝtatajn funkciojn. La lingvoreformo, kiun li en gvida pozicio kun aliaj lingvopolitikistoj projektis kaj propagandis, celis interalie purigi la lingvon de Kroatio je «serbismoj». Notindas, ke tie, kie oni forigis per oficiala kampanjo laŭdirajn serbajn poluaĵojn el la nacia lingvo, loĝas ankaŭ nekroatoj, i.a. serboj. Kiel ĉie, loĝas en Kroatio ankaŭ nenaciistoj, kies revo ne estis relerni sian lingvon en «purigita» noveladono. Per la reformo oni intence malproksimigis la lingvon de la aliaj, nekroataj varioj. Tio okazis komence de la 90aj jaroj, dum furiozis milito karakterizita de murdaj ekscesoj kaj (teritoriaj) etnaj purigoj, plenumataj de ĉiuj flankoj.

Brozović staris komence de la milito sufiĉe alte en la partia aparato de la tiam reganta HDZ kaj eĉ partoprenis tiam sekretan, poste konatiĝintan kunvenon gviditan de Franjo Tuđman, ĉe kiu oni diskutis pri Bosnio-Hercegovino kaj pri tio, ĉu Kroatio aneksu partojn de ĝia teritorio, kaj kiujn. Li do ne estis

naivulo, kiu eventuale trompis sin pri la efiko de la lingva etna purigado, kiu ne povis esti alia ol apogi la jam sen tio furiozantan naciismon. Brozović ŝajne havis sufiĉe da potenco en la registaro tuj post la sendependiĝo de Kroatio. Laŭ unu informo trovebla en la reto, oni je lia ordo brüligis milojn da ekzempleroj de unu volumo de la jugoslavia enciklopedio. Ne estis raportite, ĉu tio okazis pro ĝia enhavo ĉu pro ĝia lingvaĵo.

Tiun homon la esperantistoj de la landa asocio de UEA poste elektis sia prezidanto, plej laste okaze de elektoj fine de 2001.

Neniu kredus hazarda la tempan koincidon de la lingva etna purigado kaj la etnaj purigoj de homoj, kiujn oni pelis el iliaj hejmoj. La motivoj en ambaŭ kazoj estas homologaj. Oni celis akceli la etnan homogenecon, la etnan «purecon», ĉu en la nacia lingvo ĉu sur la naciaj teritorioj. Promociante lingvonaciismon en situacio de etna streĉeco, oni promocias ideojn, kiuj kune kun aliaj faktoroj spronas homojn al murdaj agoj.

Laŭ la raportoj pri tiu afero, kiujn mi ĝis nun vidis, homoj ofte adaptiĝis al tiu nova normlingva varianto pro vera konvinko. Sed ĉe kelkaj tio okazis pro timo, ke ili per nekonformo malkaŝus sian nenaciisman aŭ «jugoslavisman» sintenon. Tio ne estis facila afero en la naciisma etoso komence de la 90aj jaroj. Estiĝis situacio, certe antaŭvidita de la lingvonaciistoj, en kiu homoj devis kontraŭvole ŝanĝi sian lingvouzadon, ĉar ili timis negativajn sankciojn de la naciisma plimulto en la ĉiutaga vivo kaze de malobeo. Spomenka Štimec mencias iu-loke la malfacilaĵojn kaŭzitaĵojn de la purisma lingvoŝanĝiĝo en sia *Kroata milita noktlibro*.

Estas evidenta ago de diskriminacio kaj atenco kontraŭ la lingvaj homaj rajtoj, se ŝtato altrudas en pro naciismo kaj etnaj konfliktoj streĉita socia situacio etne difinitan normlingvan vari-

anton, sen atento pri la rajtoj de la naciistoj kaj etnaj malplimulto, kiuj ne deziras uzi naciisme motivitan «novlingvon».

Mi eksciis pri ĉi tiu skandalo, dum mi serĉis en la reto informojn pri rilatoj inter la Esperanto-movado kaj novdekstraj kaj naciismaj tendencoj. Kiel kutime en tiaj kazoj, troviĝas en la reto neniu signo, ke esperantistoj provis ĝis nun temigi ĉi tiun hontindan aferon, kvankam la lingva agado de Brozović estas raportita diversloke en la reto (en aliaj lingvoj ol Esperanto), kaj devus esti konata eĉ sen tio al multaj homoj en la koncernaj balkanaj landoj.

Sed ne estus juste indigniĝi unuflanke pro la faroj kaj nefaroj de kroataj, aŭ ĝenerale de balkanaj esperantistoj. Nia esperantista medio estas integra parto, ankaŭ ideologie, de la tutmonda. Ankaŭ en landoj vivantaj ekster milita situacio, en Germanio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj, la lingvopurismo fortigas en la kapoj de multaj esperantistoj la ideologion de etna «aŭtentikeco». Jen ideologio, kiun abunde uzas por siaj celoj faŝistoj kaj ksenofobiuloj.

Komenciĝas kampanjo de UEA, kiu celas kredi al neesperantistoj, ke la Esperanto-movado estas ia avangardo de «lingvaj homaj rajtoj».

1. Ĉu tiu kampanjo estos kredinda, se la esperantistoj restos indiferentaj pri ekstrema kazo de naciisme motivita atencado kontraŭ lingvaj rajtoj, kiun grava esperantisto de la UEA-medio kunrespondeas?
2. Ĉu eble la ideologio de lingvopurismo, kiu rapide disvastiĝas en la movado – ĉefe panikpropagando kontraŭ leksikaj pruntaĵoj el la angla – bezonas pli da kritika prilumado ol ĝis nun?
3. Ĉu tiu ideologio ne estas fundamente ksenofobia kaj kontraŭa al la valoroj, kiujn oni ŝatas kredi fundamentaj por la esperantistaro?

## Regeln des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Regionen

1. Der Bund ist als deutsche Gruppe der Dachorganisation der Arbeiter-Esperantisten – SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris) gemäß Göteburger Konvention von 1928 angeschlossen. Demokratie, Humanismus, Sozialismus und Freiheit sind Grundlagen für die Tätigkeit des Bundes.

Es werden ausschließlich und unmittelbar gemeinnützige Zwecke verfolgt.

Sitz des Bundes ist der Wohnsitz des jeweiligen Bundessekretärs.

2. Es soll die Weltsprache ESPERANTO in der Bevölkerung der deutschsprachigen Länder – Deutschland, Österreich und der Schweiz – bekannt gemacht werden.

Zu dem Zweck wird Informationsmaterial, u.a. eine INFO-Zeitschrift, herausgegeben. Informationsbezug über Internet ist eingerichtet.

Der Bund bemüht sich, Lernmöglichkeiten, zum Beispiel per örtlichem Kurs, Fernunterricht und in In- und ausländischen Seminaren, einzurichten. Nachweise zum Bezug von Lernmaterial und Lesestoff in Esperanto werden geliefert.

Vorträge, Ausstellungen, z.B. durch das Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur, Stadt Dortmund, sowie Herstellung von Kontakten zur Presse, zu Gewerkschaften, demokratischen Parteien und Kulturorganisationen sind Aufgaben des Bundes.

3. Die Geschäfte des Bundes führen ein Bundes-Sekretär und der Verantwortliche für Finanzen in gegenseitiger Verständigung durch. Außerdem sind Bundesberater vorgesehen. Die Finanzen werden jährlich von einem Revisor kontrolliert.

Über eine erforderliche Neubesetzung werden die aktiven Mitglieder informiert, die dann die Möglichkeit haben, Einspruch zu erheben. Eine Abstimmung im bisherigen Sinne ist nicht erforderlich.

4. Zur Erfüllung des Bundeszweckes wird von den Mitgliedern jährlich ein Beitrag erhoben. Spenden darüber hinaus sind willkommen. Der Bezug der INFO-Zeitschrift ist im Beitrag enthalten. Für deren Bezug ohne Mitgliedschaft wird eine Gebühr erhoben. Wenn eine solche Gebühr (Beitrag) nicht in den ersten drei Monaten eines Jahres für das neue Jahr eingeht, geht der Bund davon aus, dass eine Mitgliedschaft, ein Bezug der INFO-Zeitschrift nicht mehr gewünscht ist. Spätere Zahlung bewirkt zwar Fortsetzung, jedoch nur vom 1. des Monats an, an dem der Betrag auf dem Konto des Bundes eingeht; eine solche Zahlung gilt nur bis zum Ablauf des laufenden Jahres und bedingt keine Nachlieferung.

5. Mitglied oder nur Bezieher der INFO-Zeitschrift kann jeder werden, der Ziel und Zwecke des Bundes (s. 2.) anerkennt und nach Möglichkeit unterstützt. Aktive Mitglieder haben uneingeschränktes Stimmrecht. Andere Personen können Vorschläge unterbreiten, über die aktive Mitglieder befinden. Sympathisanten können den Bund finanziell unterstützen.

6. Für die Herstellung und Herausgabe der INFO-Zeitschrift wie auch der Regulierung der Internetseiten sind aktive Mitglieder verantwortlich. Jedem Esperantoprecher steht die Mitarbeit mittels Lieferung von Texten u.a. offen. Eine gleichzeitig eingegangene Mitgliedschaft oder Zeitschriftenbezug wird begrüßt. Die Redaktion hat das Recht, die Brauchbarkeit der Einsendungen zu prüfen, kann kürzen oder ablehnen.

7. Ist ein Fortbestehen des Bundes aus welchen Gründen auch immer nicht mehr möglich, wird die Vereinigung automatisch aufgelöst. Dafür sind der Bundessekretär und der Finanzbetreuer verantwortlich. Es soll aber geprüft werden, ob eine Weiterarbeit in anderer Form ermöglicht werden kann.

(daŭrige de p. 23)

**8.** Der Bundessekretär berichtet am Anfang eines Jahres von den Aktivitäten, Vorfällen und sonstigen Gegebenheiten aus dem Vorjahr in der INFO-Zeitschrift. Der Stand der Finanzen wird nur aktiven Mitgliedern bekannt gegeben.

**9.** Das Geschäftsjahr umfasst den Zeitraum vom 1. Januar bis 31. Dezember.

**10.** Diese Neuorganisation des Bundes gilt ab 1. Januar 2002. Das bisherige Bundesstatut erlischt mit gleichem Tag. Eine Abstimmung ist nicht erforderlich, jedoch werden Einwände von aktiven Mitgliedern besprochen. Förderliche Vorschläge finden Berücksichtigung, sie werden in der INFO-Zeitschrift veröffentlicht und können zu Änderungen der Regularien führen.

Oberkirch, den 20. Oktober 2001

Albert Stephan

La 18an de junio, 2002, mortis neatendite en Hanovro nia amiko

### August REDECKE

Li estis fidela membro de nia asocio jam de multaj jaroj. La entombigo jam okazis anonime. Ni ne forgesu lin.

LEA/G-Estraro

La 8an de julio de ĉi tiu jaro mortis subtenanto de nia asocio

### Bruno VOGELMANN

Ni esprimas nian kondolencon al la edzino Margarete kaj la familio.

LEA/G-Estraro

## Enhavo:

	<i>paĝo</i>
La prezidanto demisias (Estraro de LEA/G)	1
NOVAĴOJ	2
La estonteco de LEA/G (G. Mickle)	3
Sennaclista Frakcio (el: <i>Sennaciulo</i> 1948-02)	4
Kiajn versaĵojn aperigas la maldekstraj periodaĵoj (I. F. Boclort)	5
Pri naciismo kaj sennaciismo: kie estas la limoj por prudenta agado (R. Corsetti)	6
Plurtavola naciismo? (U. Broccatelli)	7
NOVAĴOJ	8

## La Socialisto

Forte kontraŭ la socia malvarmo: maja manifestacio	9
Viena partikonferenco	11
Renaskiĝo... (Karnier)	11
Scienca Semajno... (Karnier)	12
Poŝtaŭtobuso... (Karnier)	12
Pintkonferenco-saltado kontraŭ "tutmondigo" (E. Krebbers)	13
Forpasis Nikola Aleksiev (D. Blanke)	16
NOVAĴOJ	17
Edukmaniero (I. Minčev)	18
NOVAĴOJ	18
Rememoroj... (P. Jayer)	19
Eminentata esperantisto – elstara lingvonaciisto (G. Mickle)	21
<i>Regeln des Freien Esperanto- Bundes für deutsch- sprachige Regionen</i>	23